# Estrara Raporto pri la agado de UEA en 2023

La jara raporto de la Estraro de UEA resumas kaj reliefigas rezultojn de la Asocio atingitajn dum la pasinta jaro. Ĉi-jare ĝi aperas en la juli-aŭgusta numero de *Esperanto*. Se vi deziras legi pli da tiaj dokumentoj, ili troveblas en la retejo de UEA: *uea.org/teko/komitato*.

**La Estraro de UEA en junio 2024:**

- Duncan Charters (Prezidanto)
- Fernando Maia Jr. (1-a Vicprezidanto)
- Amri Wandel (2-a Vicprezidanto)
- Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario)
- Aurora Bute
- François Lo Jacomo
- Jérémie Sabiyumva
- So Jinsu
- Gong Xiaofeng (Arko)
- Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer












## Enkonduko

En 2023 Universala Esperanto-Asocio (UEA) realigis tre fruktodonan kaj stabilan agadon. Ĉiuj servoj estis akurate kaj sukcese liveritaj, inkluzive de la revuo *Esperanto*, la 108-a UK kaj la 4-a VK. La Asocio havis pli da individuaj membroj kompare kun 2022 kaj la financa saldo estis denove pozitiva. Inter la gravaj okazaĵoj estis la elekto de aldona estrarano, la ĉina profesorino Gong Xiaofeng (Arko), la ricevo de subvencio de la programo Erasmus+ kaj la transdono de Biblioteko Hector Hodler (BHH) al la Pola Nacia Biblioteko, konkludita per solenaĵo, en kiu ĉeestis aŭtoritatoj kaj la prezidanto de UEA, D. Charters. Dum la jaro li vizitis ne nur Varsovion (Pollandon), sed ankaŭ Braunschweig (Germanio) por kunfesti la jubilean 100-an Germanan E-Kongreson (GEK); Linjanon (Italio) por la komuna kongreso de ILEI kaj TEJO; Sevilon (Hispanio) por la 81-a Hispana Kongreso, kun antaŭkongresa seminario en la Universitato de Sevilo; Fortalezon (Brazilo) por la 10-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE); kaj Ĉinion, akompanata de sia edzino Cecily, por impona fino de la jaro kiel invititoj de la festo pro la 10-jariĝo de la E-Muzeo en la Universitato de Zaozhuang, kun aldonaj neforgeseblaj vizitoj al Pekino, inkluzive de la sidejo de Ĉina E-Ligo (ĈEL), kaj al Ŝanhajo, kun fina kortuŝe modela gastigado de la Ŝanhaja E-Asocio. Ankaŭ multnombraj petoj de salutmesaĝoj por virtualaj kaj surlokaj aranĝoj en pluraj kontinentoj estis plenumitaj, inkluzive por kongresoj de Irana E-Asocio (IrEA) kaj Pakistana E-Asocio (PakEsA) kaj kun persona kontribuo de originale verkita utao por ĉantado dum la celebrado de la 100-jariĝo de E-Populariga Asocio (EPA) de Oomoto. Krome li instruis ĉeeste en jarmezaj superaj kursoj de NASK (Usono) kaj Greziljono (Francio). En tiuj eventoj kaj dum la jaro li aktive interŝanĝis kun la komunumo, gvidis forumojn, aperigis artikolojn, prezentis kaj enketis por evoluigo de la strategia laborplano de UEA. La tiucela enketilo rikoltis 850 respondojn, de 704 individuaj kaj 146 neindividuaj membroj. Centoj da respondintoj, kiuj volontulis partopreni en specifaj komisionoj kaj laborgrupoj por antaŭenigi la agadon de la Asocio, nuntempe estas rekontaktitaj. Surbaze de tiu intensa dialogado kun la komunumo estis proponitaj kvar kolonoj por la strategio: *Kunlaborado* (interna, movada), *Informado* (komunikado), *Rilatoj* (eksteraj) kaj *Instruado* (lernado, kapabligo kaj esploro), kiuj naskis la akronimon *KIRI* kaj surbaze de kiuj sekvas tiu ĉi raporto.

# Kunlaborado

### Universala Kongreso (UK):

Al la 108-a UK, okazinta en 2023 en Torino, aliĝis 1323 homoj el 70 landoj. 20 homoj venis per la subteno *Partoprenu UK-on*, el kiuj 4 el Afriko. La kongresa temo estis "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj", reĝisorita de Thomas Bormann. Konsistigis la programon ĉirkaŭ 200 programeroj, inter ili Kleriga Lundo. Estis aljuĝitaj 12 diplomoj pri Elstara Agado. Premio Deguĉi iris al Miora Raveloharison. Katalin Kováts, Anna Löwenstein kaj Privas Tchikpe estis elektitaj de la Komitato de UEA novaj honoraj membroj kaj Renato Corsetti nova Honora Prezidanto. Estis funkciigitaj Telegram-grupo, reta kongresa libro kaj kongresa apo. Kongresa kuriero estis *La Taŭra Voĉo*. Paralele okazis la 51-a **Internacia Infana-Adoleskanta Kongreseto (IIK)**. En marto 2023 UEA anoncis, ke la 109-a UK okazos en Aruŝo (Tanzanio).

### Virtuala Kongreso (VK):

Sub kunordigo de la 1-a Vicprezidanto de UEA, F. Maia Jr., sukcese okazis la 4-a VK sub la sama kongresa temo de la 108-a UK. Aliĝis 1294 homoj el 95 landoj (aŭ teritorioj). E-istaj enmigrintoj en la kvin kontinentoj salutis dum la inaŭguro. La VK enhavis pli ol 200 programerojn dum pli ol 4 plenaj tagoj, el kiuj pli ol 20 programeroj estis registraĵoj de la torina UK, kio ebligis al nevenintoj al Torino konatiĝi kun UK-programeroj. La VK-platformo restis alirebla ĝis la fino de 2023. Kongresa kuriero estis *Migranta Hirundo*. Ferme de la VK la Premio Grabowski estis anoncita al la eldona teamo de *Militrakonto* (Javier Alcalde, Pascal Dubourg Glatigny, Catherine Gousseff kaj Ulrich Lins). Post la VK estis preparita kompilo pri la trakto de la kongresa temo en 2023, inkluzive de la kongresa rezolucio.

### TEJO kaj ILEI:

Pri la rilatoj kun Tutmonda E-ista Junulara Organizo (TEJO), junulara sekcio de UEA, respondecis Maia kaj la Ĝenerala Sekretario de UEA, A. Kadar. UEA aparte diskonigis pri Retoso, la reta evento de TEJO, kaj kunlaboris pri petskribo por la reaperigo de la Esperanto-kursoj ĉe Duolingo. Pri la rilatoj kun Internacia Ligo de E-istaj Instruistoj (ILEI) respondecis la estraranino A. Bute, subtene de Charters kaj Arko. Estraranoj kaj la Ĝenerala Direktoro de UEA partoprenis en kaj kontribuis al la komuna kongreso de ILEI kaj TEJO en Linjano. Pro la konfliktoj en Mezoriento UEA, ILEI kaj TEJO kunlabore preparis kontraŭmilitan porpacan deklaron.

### Scienca kaj faka agado:

Okazis sub kunordigo de la 2-a Vicprezidanto de UEA, A. Wandel (scienca agado), subtene de Kadar (faka agado). Kunlabore kun Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) realiĝis la 39-a Scienca Universitata Sesio (SUS) dum la 100-a GEK. La 76-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kune kun la Scienca Kafejo (SK) de la 108-a UK estis la plej riĉa depost 2015, kun pli ol 20 prelegoj, preskaŭ same kiel la rekorda IKU de la 100-a UK en Lillo (Francio). El tiuj prelegoj 3 konsistigis ankaŭ studsesion de AIS. Kiel en 2022, la sesio en Torino estis hibrida. Papere kaj elektronike aperis rekorde ampleksa IKU-libro, kun ĉiuj tekstoj de la IKU- kaj SK-prelegoj. Redaktis Anna Striganova, Dima Ŝevĉenko kaj Amri Wandel, eldonis Impeto. Aĉeteblas en la Libroservo de UEA. La teksto de la IKU-prelego de Wandel aperis aparte en la libreto *Novaj esploroj pri vivo ekstertera: eksterplanedoj, NIFOJ kaj SETI*. La prelegoj estis refaritaj ankaŭ por la 4-a VK. Aldone aperis en la jutubkanalo UEAviva ankaŭ la IKU- kaj SK-prelegoj de la 3-a VK (2022). Kadre de la 108-a Premio Pirlot por la plej bona scienca libro de la jaro, organizita de AIS estis anoncita al (unua premio) *La Kosmo kaj Ni* (4-a eldono) de D. Galadi kaj Wandel kaj (dua) al *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado* de H.-M. Maitzen kaj R. Fössmeier. Dum la UK okazis la Faka Forumo kaj la Movada Foiro. Dum la VK okazis la Virtuala Movada Foiro. UEA aparte diskonigis la Internacian Retan Interfakan Simpozion (IRIS), denove organizitan de la komisionoj de TEJO pri Edukado, Scienco kaj Kulturo kaj Universitata Agado kadre de Retoso. Regule ĉiumonate aperis la rubriko *Fake Science Profesie tra la mondo en Esperanto*, kun informoj pri scienca kaj faka agado en Esperantujo kaj pri sciencaj novaĵoj de la mondo.

### Kultura agado:

Okazis sub kunordigo de Maia, subtene de Kadar. UEA daŭre aŭspicias la Interkulturan Novelo-Konkurson (INK). Ĝi diskonigis la 3-an INK, kies honora prezidanto estas la kataluna verkisto Jordi Solé i Camardons: 1100 aŭtoroj sendis konkursaĵojn en 6 lingvoj; pli ol 1000 el ili estas nee-istoj (komunikado kun ili okazis en iliaj naciaj lingvoj kaj en Esperanto). La rezulto de la 3-a INK estos anoncita dum la 109-a UK en Aruŝo, simile al tio, kiel estis por la 2-a INK, kies rezulton oni anoncis en la 108-a UK en Torino. La novelaro de la 2-a INK, *La lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj*, eldonita de KAVA-PECH, estis disdonita en la kongresa sako. Ĝi ankaŭ aĉeteblas ĉe la Libroservo de UEA. Fine de 2023 estis lanĉita la 4-a INK sub la temo "Artefaritaj intelektoj, pensantaj maŝinoj kaj *Homo sapiens*". Nova verko aldoniĝis al la Serio Oriento-Okcidento (n-ro 62): *Reĝo Ubuo* tradukita el la franca de Thomas Larger kaj Thierry Tailhades, eldonita de Espéranto-France. La UK kaj la VK havis riĉan kulturan kaj artan programojn: okazis Oratora Konkurso, nacia kaj internacia Artaj Vesperoj, prezento de la Internacia Esperanto-Ĥoro plus koncertoj, teatro kaj prezento de aŭtoroj kaj eldonejoj, ĉio subtene de Vinilkosmo, komisiitoj Linda Le Nepveu, Zdravka Boytcheva kaj diversaj artistoj kaj kulturaktivuloj. Sukcese okazis la 74-a eldono de Belartaj Konkursoj de UEA (BK), kiu ricevis 180 konkursaĵojn. Gvidis la ceremonion (BK-feston) por disdono de agnoskoj (premioj kaj honoraj mencioj) dum la UK la sekretario de la BK, Miguel Gutiérrez Adúriz, kun subteno de la eks-estraranino de UEA Sara Spanò. Konceptis la ceremonion la sekretario kaj prezidanto de la BK, respektive Gutiérrez Adúriz kaj Miguel Fernández. La premiitaj verkoj aperis en la libro *Belarta rikolto 2023*, eldonita de Mondial kunlabore kun UEA. Dum la BK-festo estis ludata la skeĉo *Ne tute, nur duone*, de Tiberio Madonna, premiita en 2020. UEA alvokis por la 75-a eldono de la BK.

### Esperanto-centroj:

Sub kunordigo de la estrarano F. Lo Jacomo UEA sekvas kaj subtenas plurajn E-centrojn, kiuj daŭre vigle agadas. Lo Jacomo mem estas prezidanto de la Kulturdomo de Esperanto, Kastelo Grezljono, kie Charters gvidis kurson jarmeze. Charters ankaŭ vizitis la centron en Zaozhuang. Difino de E-centro daŭre estas debatinda, sed eblas konsi-

deri centro lokojn (fizikajn aŭ virtualajn), al kiuj direktiĝas kaj de kiu disiras multaj diversaj agadoj por Esperanto, ĉu kulturaj, ĉu esploraj, ĉu komunumaj. Lo Jacomo intencas gvidi projekton pri komuna platformo, per kiu la centroj kunlaboru, por kio la Eventa Servo de UEA kaj TEJO ludos rolon. Aldone menciindas en 2023 la agadoj de Interkultura Centro Herzberg (Germanio), Liaoning-a E-kultura Klubo (Ĉinio), Seula E-Kulturcentro (Koreio) kaj Kultura Kooperativo de E-istoj (Brazilo).

**Ĝemelaj urboj:** Agado pri ĝemelaj urboj daŭre viglas, interalie en Italio: Torino nuntempe havas 14 ĝemelajn urbojn. La komisiitoj de UEA Marc Giraud (el Parizo) kaj Debora Rossetti (el Romo) okazigis ĉiumonatajn retkunvenojn kun ĉiumonate nova plia urbo en la mondo kaj nova diskuttemo. Ĉar laŭkontrakte Parizo estas la sola ĝemela urbo de Romo, kaj same Romo de Parizo, ili organizis vojaĝojn de e-istaj parizanoj al Romo (en oktobro 2022) kaj reciproke (en aprilo 2023). Lo Jacomo prelegis pri ĝemelaj urboj interalie dum la UK, dum kiu li prezentis muntaĵon de intervjuoj de pluraj aktivuloj sur tiu kampo.

**Landa agado:** Okazis sub kunordigo de Kadar, kunlabore kun So J.-s. (Azio kaj Oceanio, subtene de Arko), Wandel (Mezoriento kaj Nordafriko), J. Sabiyumva (Afriko), Bute (Eŭropo, subtene de Lo Jacomo) kaj Maia (Ameriko, subtene de Charters), kune kun Stefan MacGill (komisiito), R. Corsetti (helpanto) kaj la diversaj regionaj komisionoj, kies konsistoj kaj agadplanoj legeblas en la marta numero de revuo *Esperanto*.

### Azio kaj Oceanio

Kunlabore kun la Komisiono de UEA pri Azia kaj Oceania E-Movadoj (KAOEM), agado en 2023 komenciĝis per komuna kongreso kaj somerkursaro (januaro) inter Aŭstralio kaj Nov-Zelando en Melburno (Aŭstralio), organizite de Aŭstralia E-Asocio. Nepala E-Asocio okazigis la 5-an Specialan Ekskurson en Nepalo (februaro). Sinsekvis landaj kongresoj: 14-a Ĉina Kongreso (ĈEL, marto, Pekino), 71-a Kansaja Kongreso (KLEG, junio, Himeĵi, Japanio), 55-a Korea Kongreso (Korea E-Asocio, oktobro, Seulo), 110-a Japana Kongreso (Japana E-Instituto, decembro, Kawasaki) kaj 46-a Pakistana Kongreso (PakEsA, decembro, Lahoro). EPA-Oomoto celebris 100-jaran Memorfeston de Oomoto (septembro, Kameoka). Kaj la 41-a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana, Korea kaj Vjetnama Junularoj okazis en decembro, en Hanojo kaj Ninh Binh (Vjetnamio).

### Mezoriento kaj Nordafriko

Kunlabore kun la Komisiono de UEA pri Mezoriento kaj Nordafriko (MONA) okazis dum la UK kunveno gvidata de Corsetti. Okazis la 23-a Israela Kongreso (E-Ligo en Israelo/ELI, aprilo, Tiberiado), kun 10 eksterlandaj partoprenantoj, kiuj plejparte aliĝis ankaŭ al la 6-taga postkongreso tra Israelo kaj Jordanio. Ankaŭ okazis la 10-a Irana Kongreso (IrEA, aprilo, virtuale, kun samtempa elsendado en UEAviva. Okazis elementaj kaj progresigaj kursoj en du iranaj universitatoj. Regule aperis la organo de IrEA, *Iranaj Esperantistoj* (kvar numeroj). Daŭre estis retaj kursoj en diversaj lingvoj kadre de la projekto “E-Kursaro Tibor Sekelj” (EToSo). ELI aperigis rete kaj papere 3 n-rojn de la bulteno *Israela Esperantisto*.

### Afriko

Kunlabore kun la Afrika Komisiono de UEA okazis diversaj agadoj, ĉefe subtene al la 109-a UK, okazonta en Aruŝo en 2024. Per la programo *Ni semas* stariĝis kurso en Aruŝo, en kiu lernadas kaj progresas dekoj da e-istoj. Per aparta donackampanjo stariĝis la Afrika Retradio. La komisiono konstruis la projekton Hakuna Matata, subvenciata de Instituto Hodler ‘68 por subteni la agadojn de la 1-a UK en Afriko, ĉefe venigon de afrikanoj, je la sumo de 38 000 €. Sabiyumva intense kunlaboris kun la Asocio Nacia de Esperanto en Burundo, kie plu vigliĝis la movado, kun starigo de novaj kluboj en Buĵumburo kaj aliaj urboj. Demokrata Kongolanda E-Asocio elektis novan estraron. La junulara movado en Afriko vigliĝis danke al klopodoj de la Komisiono de UEA kunlabore kun junuloj. Okazis multaj retaj eventoj, kunsidoj kaj kursoj, kio montras, ke afrikaj e-istoj alkutimiĝas je retaj eventoj. Senegala Junulara E-Asocio estis akceptita kiel nova landa sekcio de TEJO. En Madagaskaro okazis kristnaska seminario gvidata de M. Raveloharison kaj Ranja Lydie Zafinifotsy.

### Eŭropo

La Komisiono de UEA por agado en Eŭropo tre proksime kunlaboris kun Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE) kun la celo revigligli la agadon por Esperanto en Eŭropo. Ĉiuj objektivaj observantoj vidas la daŭran malfortiĝadon de la tradicia movado en Norda Eŭropo dum en centra Eŭropo la landaj movadoj ankoraŭ ne atingis la stabilecon, kiun ili havis antaŭ la soci-politikaj ŝanĝiĝoj en la fino de la antaŭa jarcento. Samtempe la komisiono klopodis rilati kun gvidantoj kaj oficejoj de Eŭropa Unio (EU) por informi ilin pri la ebloj, kiujn Esperanto liverus al Eŭropo kaj en ĉi tiu kampo la agado intensiĝos en 2024 pro la voĉdonado por la Eŭropa Parlamento. Kelkaj landaj asocioj jam agas laŭ la plano de la komisiono, “Aperi aŭ malaperi”, kiu antaŭvidas informadon al ĉiuj kandidatoj kaj ankaŭ tradician informadon al la publiko. Interesaj eksperimentoj estis faritaj en 2023 de kelkaj aktivuloj por provi la efikon de reta informado al gejunuloj. Interesa subagado estis la kunlaboro de e-istoj en balkanaj landoj. Informoj kaj manieroj kunlabori aperas ĉe Vikio de UEA.

### Ameriko

La Amerika Komisiono intense kunlaboris en 2023, kiam okazis la plej grava kontinenta evento, nome la 10-a TAKE, en Fortalezo, kune kun Brazila E-Ligo (BEL), Brazila E-ista Junulara Organizo (BEJO) kaj la loka organizo Cearaa E-Asocio. La komisiono inaŭguris la konkurson Partoprenu TAKE-n, kiu venigis nepagipovajn amerikanojn el ekster Brazilo. Amasa subteno de brazilanoj, inkluzive tre videblajn kaj entuziasmajn gejunulojn, pluraj el kiuj partoprenas en transiro de gvidantaro de BEL/BEJO, certigis kulture kaj emocie elstare riĉan eventon. Multe aktivis per internacia kontaktado kaj plurlanda vojaĝo la komisionestro Guy Matte, raportinto (kun Charters) de TAKE por *Esperanto*. En la evento ĉeestis ili kaj Lo Jacomo, kiu prelegis (Maia ne povis ĉeesti pro samtempa profesia vojaĝo). Charters, kiel en aliaj diversaj okazoj, gvidis sesion pri strategio, por rikolti pli da ideoj kaj rekomendoj, celante inkluzivigi k.e.p. multajn e-istojn en tiu iniciato. En la Kongreso partoprenis ankaŭ novaj komunumanoj pro la sukcesa informado kaj retaj kur-

soj daŭrigataj en la kontinento. Inter septembro kaj novembro okazis la 4-a kurso por hispanparolantoj, partnere kun TEJO kaj Kolombia E-Ligo: ĉiuj finlernintoj, 50 homoj, povis tuj poste partopreni la 4-an VK-n. La komisiono ankaŭ renovigis sian membraron kun novaj partoprenantoj el Ĉilio kaj Usono kaj multe aktivis por revigligi certajn landajn asociojn kiel la Venezuela kaj la Ekvadora. Krome ĝi subtenis informagadon al nee-istoj en unu el la plej grandaj libro-foiroj de Latinameriko, la Internacia Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵanejro, kiu dum 10 tagoj altiras kutime pli ol 600 000 vizitantojn, ĉefe junulojn, lernejanojn, universitatanojn, legemulojn kaj interesatojn pri kulturo ĝenerale. En 2023 la trian fojon la Esperanto-movado partoprenis la eventon, sub kunordigo de Asocio E-ista de Rio-de-Ĵanejro (AERĴ) kaj BEL. La unuan fojon UEA subtenis la agadon kaj zorgis, ke la organizantoj povu ricevi entute la sumon de 4500 €.

**Reta agado:**
UEA aŭspicias kaj sponsoras la fonduson Instigo, kiu subtenas E-agadojn provizantajn ĉefe retajn servojn en Esperanto, sub gvido de Yves Nevelsteen, komisiito de UEA pri reta agado. Kelkaj el la agadoj estas: **Komputeko** (*komputeko.net*), prikomputila terminokolekto; tradukado de **Telegram** al Esperanto (*telegramo.org*; Telegram estas multe uzata de komunumoj kaj eventoj, interalie de UK, IJK kaj ILEI-eventoj); tradukado de **WordPress** al Esperanto (*eo.wordpress.com*; Wordpress estas uzata interalie de la retejo Libera Folio); **Vikipedio** (*eo.wikipedia.org*), **Vikidatumoj** (*wikidata.org*) kaj aliaj vikimediaj retejoj, nemezureble gravaj por la teno de la memoro de Esperanto kaj ankaŭ por montri la diversecon de la uzo de nia lingvo, kunlabore ankaŭ kun la faka asocio Esperanto kaj Libera Scio/Vikimedio Esperanto (ELiSo/Wikimedia EO/VMEO, *esperanto.wiki*). Aldone Instigo funkciigas la Eventan Servon de UEA kaj TEJO, modernan internacian kalendaron pri E-rilataj eventoj. En 2023 la ĉefa zorgo de la teamo de Eventa Servo, gvidata de Y. Nevelsteen kaj Fernando Ŝajani, estis ĝia normala, rutina funkciado kaj kresko per kreo de novaj rimedoj. La teamo laboris pri konsciigo pri la servo aparte ekster Eŭropo. Ĉar la UK en 2024 okazos en Afriko, la teamo ĉefe fokusis sian atenton al tiu kontinento. Fine de 2023 Eventa Servo gajnis novan funkcion: Raportoj. Ankaŭ regule kaj konstante funkciis la retejo *UEA.facila.org*, kun informoj kaj novaĵoj pri UEA, la E-movado, ĝenerala scio kaj kulturo en facila Esperanto. Redaktoroj estas A. Löwenstein, Maurizio Giacometto kaj Felszeghy Judit kun granda teamo de kunlaborantoj. UEA.facila ankaŭ estas en diversaj sociaj retoj.

**Komunumo:**
Bedaŭrinde en 2023 forpasis la honora membro Ferenczy Imre (1932-2023). Dum la jaro estis internacia prepara kunlaboro por la 100-jariĝo de la eks-prezidanto de UEA Grégoire Maertens kaj starigo de premio je lia nomo. Eventa Servo denove utilis por arigi informojn pri la multaj Zamenhoffestoj en la mondo, danke al kunlaboro kun Nevelsteen.

## Informado

En julio 2023 UEA dungis novan oficiston por subteni la agadon de la Asocio pri komunikado, nome Lu Wunsch-Rolshoven. Li analizis la aktualan situacion de Esperanto, interalie kompare kun la angla kaj sekve de la nunaj kapabloj de maŝina tradukado. Pri tio aperis artikolo en *Esperanto* kaj estis prelego dum la 4-a VK. Sendepende de la nuna granda disvastiĝo de la angla, plu estas fortaj argumentoj por pli grandskala aplikado de Esperanto. Efektive la unua statuta celo de UEA estas “disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto” kaj unu el la celoj de la kunlaboro kun L. Wunsch-Rolshoven estas precizigi en 2024, kio estu la efektiva tasko de UEA sur tiu ĉi kampo. Granda defio estas la falsaj onidiroj pri Esperanto, kiuj bedaŭrinde ankoraŭ cirkulas eĉ inter lingvistoj. Pri la demando kiel realigi la unuan celon de la statuto okazis kontaktoj kun fakuloj pri varbado. Estis instruite, ke la nocio *informado* riskas eliri nur de la propra vidpunkto, dum *komunikado* enhavas plian ideon, nome unue esplori antaŭsciojn, antaŭjuĝojn, opiniojn kaj sentojn de celgrupo, strategie informi kaj interŝanĝi kaj fine akompani ĉu okazas ŝanĝoj tiurilate. Tiusence en 2023 la informa agado estis ampleksa kaj varia, foje ekskluzive informcela, foje kiel parto de pli granda agado ankaŭ kun aliaj celoj. Menciindas, ke pluraj membroj de UEA partoprenis en vojmontra atingo por informado en la amaskomunikiloj, nome profesie kompilita, filmita raporto pri Esperanto de Al-Jazeera, kiam dekmiloj da arabparolantoj informiĝis pri Esperanto pro vojaĝo de juna raportisto al Esperanto-centroj kaj intervjuoj, historiaj filmetoj, afiŝoj kaj desegnoj. La agado okazis kun la helpo de la kolekto de la Esperanto-Muzeo en Vieno kaj ties direktoro, Bernhard Tuider, kiu prezentis simpatian vivplenan perspektivon pri Esperanto kiel historia, ideologia kaj nuntempa kultura fenomeno. Daŭre sukcesa estis informagadoj en Ameriko: unue pro la 4-a kurso por hispanparolantoj supre menciita (samtempe instrua kaj komunumkrea agado), 487 homoj spektis inaŭguran lecionon pri Esperanto en la hispana, 177 ĉeestis almenaŭ 2 lecionojn kaj 50 partoprenintoj ricevis atestilon kaj aliĝis al UEA; kaj due pro la agado en la Bienalo, kie estis profesia E-budo kun libroj kaj kiam disdoniĝis pli ol 8 mil informiloj dum 10 tagoj (por aparte interesa komunumo, t.e. librokonsumantoj). Ankaŭ en Eŭropo estis serio da agadoj: eŭropaj e-istoj traktis kun funkciuloj kaj politikistoj en instancoj de EU por montri al ili la avantaĝojn de Esperanto por certigi la multlingvecon de Eŭropo; kaj oni testis en malgranda skalo, sub gvido de Andrea Kueck, la eblojn rekte varbi gejunulojn per la plej modernaj sociaj komunikiloj. Daŭre funkciis sub flegado de Corsetii la laborgrupo nomata Zorgantoj pri informado (ZPI), kun instigo al tradukado al multaj lingvoj kaj diskonigo de mesaĝoj pri Esperanto kaj la starpunktoj de la E-movado. ZPI funkcias per retpoŝta diskutgrupo; aparte menciinda estas la kunlaboro kun italaj, japanaj kaj ĉinaj e-istoj.

**Poliglota agado:**
Denove UEA estis ĉefsponsoro de la Poliglotaj Renkontiĝoj, ĉeeste kaj rete. En ambaŭ kunvenoj Esperanto estis vaste diskonigata. En la eventoj partoprenas lingvemuloj, kiuj ne ĉiam estas bone informitaj pri Esperanto. Tamen pro tio, ke ne temas pri Esperanto-eventoj, sed pri poliglotaj eventoj, la strategio estas, ke la informado pri Esperanto okazu ekvilibre kaj donu rigardojn al la Esperanto-agadoj en la mondo, kiuj ne ĉiam estas evidentaj al la ĝenerala publiko, do ne nur pure lingva prezento de

Esperanto. Kelkaj el la diversaj okazoj de tia prezentado de Esperanto spekteblas en la jutubkanalo de la evento. La virtualan renkontiĝon salutis Charters, kadre de la sponsorado de UEA, montrante kunsentemon al la egalecaj celoj de plurlingvismo kaj la specialan por poliglotoj allogecon de Esperanto kiel transkultura interkomunikilo. Federico Gobbo, katedrulo pri Esperanto kaj interlingvistiko en la Universitato de Amsterdamo, prelegis, enkondukante la koncepton de Esperanto kiel lingvo ricevema (pri tio vidu artikolon en *Esperanto*). Aldone informa prezento pri Esperanto okazis unuafoje en la hispana kaj funkciis diversaj babilĉambroj en Esperanto, kio donis al poliglotoj la eblon interŝanĝi ideojn kun ĉeestantaj e-istoj kaj konatiĝi kun la lingvo en neformala etoso.

## Rilatoj

**Eksteraj rilatoj:** Eksteraj rilatoj, ĉefe kun Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj Unesko, estas gravega agadkampo, en kiu nuntempe kunlaboras trideko da aktivuloj. En 2023 estis rezigno pri kunlaboro de Barbara Despiney ĉe Unesko en Parizo: al ŝi UEA elkore dankas post pli ol kvardekjara aktivado. Revenis al kunlaboro Stefano Keller ĉe UN en Ĝenevo kaj aliĝis Shneur Agronin kiel tria reprezentanto de UEA ĉe UN en Novjorko. Daŭrigante sian klopodon konsciigi UN-on pri la ekzisto de lingva problemo, la novjorka teamo gvidata de Humphrey Tonkin kaj Francis Hult sukcesis gravajn paŝojn en tiu direkto, interalie ene de la Komitato de NRO-oj partneraj de UN (CoNGO), en kiu UEA estas estrarano ekde 2018 ĝis 2025. En februaro, okaze de la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, F. Hult intervenis pri lingvaj demandoj en konsultiĝa kunsido de CoNGO kaj en festa kunsido organizita de la Bangladeŝa Misio. En Ĝenevo, en marto, tripersona delegacio (Alain Favre, S. Keller kaj Nicole Margot) reprezentis UEA en la Konsilio pri Homaj Rajtoj kaj, en julio, en kunsido pri rajtoj de indiĝenaj popoloj, EMRIP-16. En aprilo Lo Jacomo, H. Tonkin, Alfred Heiligenbrunner, Jane Edwards kaj B. Tuider ĉeestis en Vieno ceremonion pri la 75-jariĝo de CoNGO. En junio la Komitato pri Lingvoj, kreita en 2021, prezidata de Hult kaj vicprezidata de Tonkin, gvidis brilan retan kunsidon pri la temo "Konstrui reciprokan kompreniĝon pere de multlingvismo", kun partopreno de Csaba Kőrösi, prezidanto de la 77-a Ĝenerala Asembleo de UN, de pluraj aliaj altranguloj en UN kaj de pluraj ambasadoroj. Samtempa interpretado okazis en la ses oficialaj lingvoj de UN plus Esperanto, unuafoje uzata en tiel prestiĝa kunsido. La 108-a UK dediĉis du kunsidojn al UN kaj Unesko, unu publikan gvidatan de Tonkin kaj unu privatan por la reprezentantoj de UEA en la diversaj sidejoj de UN (Novjorko, Ĝenevo kaj Vieno) kaj Unesko (Parizo). Tiu ĉi kunsido inaŭguris planitan serion da regulaj kunsidoj por kunorganizi la agadon de UEA en tiuj diversaj sidejoj, esperante baldaŭan reprezentiĝon ankaŭ en la kvina sidejo: Najrobio. Unua reta kunsido okazis jam en septembro: 16 partoprenantoj el UEA kaj TEJO interkonatiĝis kaj prezentis konkretajn agadojn: partoprenon de ĝenevanoj en forumo pri minoritataj popoloj, tradukadon de afiŝoj kaj mesaĝoj (Corsetti), retejoj (Rafael Lima, *esperantoporun.org* kun 16 mil vizitoj en 9 monatoj kaj *esperante.wordpress.com* kun 1200 sekvantoj), sociaj retoj (R. Lima, Tvitero/Ikso kun 1200 sekvantoj, Instagramo kun 600 sekvantoj; Jon Liechty, Fejsbuko kun 1000 membroj; ankoraŭ ne Telegramo). En Novjorko UEA disponas oficejon kun prestiĝa adreso, 777 United Nations Plaza, fronte al la ĉefsidejo de UN, en la sama konstruaĵo kiel CoNGO kaj multaj NRO-oj. Danke al privataj donacoj la meblaro de tiu oficejo estis tute renovigita. Temas fakte pri parto de ĉambro, sed UEA kaj Esperanto USA interkonsentis pri financado de la lupreno, grandparte per personaj donacoj (Fonduso 777). Tonkin regule eldonas, sesfoje jare, la informilon *Esperanto por UN*, tradukatan al la angla kaj franca. Por dekkvino da mondaj tagoj (edukado, memoro pri la viktimoj de la Holokaŭsto, gepatra lingvo, virinoj, eliminado de rasa diskriminacio, familioj, rifuĝintoj, paco, tradukado, pliaĝuloj, UN, toleremo, homaj rajtoj – 75-jariĝo de la Universala Deklaracio en 2023 – kaj nia Esperanto-tago mem li verkas aŭ verkigas mesaĝojn de UEA, same tradukatajn al la angla kaj franca, akompanatajn de afiŝoj ellaboritaj de Lima kaj tradukitaj en plurajn lingvojn (ĝis 24 lingvoj). Multe da tia materialo troveblas en la supre menciitaj retejoj. Aparte la Internacian Tagon de Paco festas interalie grupo de plurdek NRO-oj partneraj de Unesko, de pli ol dek jaroj, sub gvidado de Michel Thouzeau (pacmovado). Pro sia grava kontribuo al la evento pri korusoj en Toloso (Hispanio) en 2022, UEA iĝis unu el la gvidantoj de la grupo, kiu organizos en 2024 kaj 2025 novan eventon: "Danco kaj Paco kundivide", kun specifa retejo en kvar lingvoj (angla, franca, hispana kaj Esperanto), konstruita de la organizo Pangeo (pri inĝenierado de paco): *danse-paix2024.org*. UEA-reprezentantoj partoprenis ambaŭ Ĝeneralajn Konferencojn de Unesko, eksterordinaran fine de junio por rajtigi Usonon remembriĝi en Uneskon, kun kelkaj avantaĝoj, kaj la ordinaran en novembro, dum kiu UEA rajtis, kiel kutime, alparoli la plenon dum la debato pri ĝenerala politiko. Pro la triminuta interveno de Lo Jacomo dankis en Esperanto la prezidanto de la Ĝenerala Konferenco, Simona-Mirela Miculescu (Rumanio). Grava decido de tiu ĉi Ĝenerala Konferenco estas, ke la venonta Ĝenerala Konferenco okazos en Samarkando (Uzbekio), fine de 2025: malmultaj Ĝeneralaj Konferencoj okazas ekster Parizo kaj en la lasta (Sofio, 1985) Unesko akceptis duan rezolucion favoran al Esperanto. UEA klopodos, ke en la venonta ĝi akceptu trian rezolucion favoran al Esperanto, lige al tio, ke Esperanto estas subtenata jam de pluraj ŝtatoj: Pollando kaj Kroatio jam enmetis Esperanton en siajn listojn de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj de la Homaro, en aliaj landoj sama akcepto survojas kaj esperindas sukcesi konvinki Uneskon tiel agnoski Esperanton mondnivele, por kio ni pruvu nian pretecon kunlabori pri la programoj de Unesko, interalie pri la Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj. Reciproke estas klopodo, ke Unesko deklaru la 26-an de julio monda tago de Esperanto: Corsetti vigligis kampanjon instigante e-istojn efektive festi tiun ĉi tagon kaj konvinki siajn delegaciojn ĉe Unesko apogi la rezolucipeton: jam venis favoraj respondoj, interalie de Brazilo. Ankaŭ reprezentantoj de D. R. Kongo montriĝis tre favoraj kaj partoprenis la 108-an UK-on. Daŭre aperas *Unesko-kuriero* en Esperanto, eldonata en Ĉinio, danke al teamo de volontulaj tradukistoj en diversaj landoj, sub kunordigo de UEA (4 numeroj aperis en 2023). Defio notita estis malfacilo akiri paperajn ekzemplerojn, pri kio UEA provas agi.

# Instruado

**Universitata agado:**

La **Interlingvistikaj Studoj** de la Universitato Adam Mickiewicz (AMU) en Poznano (Pollando) trapasis pintan jaron en 2023. Dum sia 25-jara historio ili havis la plej grandan grupon eĉ en la 3-a jaro de la postdiplomaj studoj. Startis 3 specialiĝoj en septembro: 1) interlingvistiko kombinita kun movadhistorio, al kiu kontribuis Vera Barandovská-Frank, Ida Stria kaj Mark Fettes; 2) tradukado, kiun gvidis Chris Gledhill kun kontribuo de Nicolau Dols kaj Ilona Koutny; 3) la tradicia instruista trejnado, gvide de Kováts kun kontribuo de I. Koutny, Zsófia Kóródy kaj Charters. Al ĉi-lasta formado aliĝis kromaj 6 homoj. La komunan kurson "Nuntempaj problemoj de Esperanto-movado" la unuan fojon gvidis M. Fettes. La unika magistra grupo el 10 ĉinaj studentoj (7 el la Universitato de Zaozhuang) komencis sian duan jaron en oktobro surloke en Poznano. Ili daŭrigas siajn esperantologiajn kaj informadikajn studojn, perfektigas ankaŭ siajn anglajn sciojn kaj pretigas siajn diplomlaboraĵojn. En septembro aperis la 3-a volumo de la serio *Interlingvistikaj Studoj*: *Komunikado kaj Esperanto* kun kontribuoj de la instruistoj kaj partoprenantoj de la postdiplomaj studoj. En 2023 la Estraro de UEA laboris por renovigi la mandaton de F. Gobbo (la tria mandato, komenciĝinta en februaro 2024) ĉe la **Speciala Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo**. Ĉiu mandato daŭras kvin jarojn. La jaro 2023 estis la kvina jaro de lia dua mandato. Menciinde, en 2023 li aperigis anglalingvan faklibron pri epistemologio de lingvopolitiko kaj planado kunaŭtore kun Michele Gazzola, David C. Johnson kaj Jorge Antonio Leoni de León per la eldonejo Springer kaj specialan numeron de la fakrevuo *Kervan* honore al la 85-jariĝo de Fabrizio A. Pennacchietti, en kiu Gobbo redaktis la esperantlingvan sekcion pri Interlingvistiko, kiu enhavas kvar originalajn artikolojn (libere legebla rete). En la akademia jaro 22-23 ekzameniĝis 8 studentoj, en 23-24 11 studentoj. Triono el ili estis nederlandanoj, la aliaj venis de EU, Usono kaj Ĉinio. Duono de la studentoj jam ekrigardis Esperanton per Duolingo aŭ alia libere alirebla bitmaterialo, aparte jutubaĵoj. La kutima vizito de Prof. Davide Astori (Universitato de Parma) okazis en majo 2023, ĉar tiam studentoj jam havas sufiĉan nivelon por senprobleme sekvi gastlecionon de universitatano pri Interlingvistiko. La Esperanto-klaso de 22-23 estis preskaŭ ekvilibre distribuata inter nederlandaj kaj internaciaj studentoj. La kurso de Esperanto kalendariĝas en aprilo kaj majo; tio ebligas informi la studentojn pri la agadoj organizataj de TEJO kaj UEA jarmeze, perrete, hibride, surloke. Gobbo referis unu magistran, unu bakalaŭran kaj unu tezan disertaĵojn en 22-23. Lia oficiala retpaĝo pri publikaĵoj (*uva.nl/profile/F.Gobbo*) listigas 7 samrangulajn reviziitajn erojn, 1 akademiaĵon, 1 popularigan artikolon, kaj 2 aktojn post prelego. Gobbo partoprenis retajn eventojn organizitajn de UEA aŭ TEJO, ekzemple la VK-n, kiam li prelegis pri Esperanto kiel kontaktolingvo kaj movebleco, kaj IRIS. Lia prelego ĉe IRIS iĝis artikolo en *Esperanto*. Laŭ iniciato de Bute estiĝis nova artikolserio en *Esperanto* kadre de la jam ekzistanta rubriko "Esperanto en universitatoj", sub la titolo *Pri katedro sed ne el katedro*. Dum la jaro UEA regule partoprenis en la **laborgrupo "Esperanto en universitatoj"** de ESF/UEA/ILEI/TEJO, kun IrEA funkcianta en la kadro de ILEI kaj celanta kunteni kaj kunlaborigi e-istojn laborantajn en universitatoj. Okazis retkunvenoj ĉiun monaton, sub la nomo "Kunpens(ig)ado pri Esperanto kaj Universitatoj" (spekteblaj en UEAviva) en kiuj oni diskutis pri agadoj okazantaj en pluraj universitatoj tra la mondo. Sekve de interkonsentoj estis aranĝitaj prelegoj en Esperanto fare de eksterlandaj profesoroj en virtualaj kunvenoj. La nombro de kunligataj universitatanoj restis daŭre pli ol 100 kaj proksima al 150. En 2023 la ĉefaj novaĵoj estis kunligiĝo kun ĉinaj universitatoj kaj partopreno en kursoj organizataj de iranaj universitatoj kaj de la hispana universitato en Sevilo. UEA funkciigis kunlabore kun ILEI kaj la afrika universitato EUC en D. R. Kongo retan kurson pri interlingvistiko, instruatan de Ahmad Mamduhi, kiu samtempe instruas Esperanton rete kaj ĉeeste en la Universitato de Teherano. Bona kunlaboro okazis kun ĉinaj, hispanaj kaj francaj universitatoj.

**Rilatoj kun Edukado.net en instruagadoj de UEA kaj de ties landaj kaj fakaj asocioj:**

La teamo de *Edukado.net*, gvidata de Kováts, multflanke agadis pere de siaj retaj materialoj, helpis realigon de projektoj kaj agadoj por disvastigo de Esperanto kaj ĝia altnivela instruado. La teamo okazigis paroligajn kursojn dum la 108-a UK. Per gvidado de ĉeestaj kursoj kaj trejnadoj ĝi kontribuis al la aranĝoj de la Aŭstralia, Brita, Usona kaj Beneluksa kongresoj; al la staĝo de Espéranto-Provence; kaj Kováts instruis en la 100-a Memorfesto de EPA-Oomoto. *Edukado.net* ankaŭ ebligas retan surfacon por la Interlingvistikaj Studoj en Poznano, kie Kováts respondecis pri la teknika realigo kaj filma dokumentado de la sesioj kaj gvidis ankaŭ la metodikan kurson.

**KER-ekzamenoj:**

La unulingvaj Esperanto-ekzamenoj de UEA laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER-ekzamenoj) estas unu el la plej gravaj servoj de UEA, realigataj de sia KER-Ekzamena Centro (KER-EC), kunlabore kun la Akademio de Esperanto (AdE) kaj la retejo *Edukado.net*. En 2023 Kováts gvidis teamon por la realigo de retaj ekzamenoj, aldone al ĉeestaj dum la 108-a UK. En la preparo de kandidatoj kaj okazigo de ekzamenoj grandan meriton havas la "geonkloj" de la programo Ekparolu!, la Ekzamena Laborgrupo de la Akademio de Esperanto kaj studentoj de la Interlingvistikaj Studoj de Poznano. En 2023 krom la ekzamenoj estis dezajnitaj kaj kreitaj novaj paperaj dulingvaj ekzamenatestiloj, en Esperanto kaj en dudeko da naciaj lingvoj, kiujn eblas mendi aldone al senpaga elektronika atestilo (ĝis nun volis havi la belegan libretoforman atestilon pli ol 200 sukcesintoj). Granda novaĵo de la jaro estis la kreo de nova ekzamenretejo, kiun *Edukado.net* realigis kun la programisto Judith Meyer per financa subteno de Esperantic Studies Foundation. La nova ekzamenretejo ekde junio 2023 estas uzata por retaj ekzamenoj de UEA kaj estontece por interagaj lernmaterialoj kaj provekzamenoj de *Edukado.net*. Okazis publika konsulto pri interesiĝo rete ekzameniĝi en 2024. **KER-ekzamensesioj en nombroj:** En la jaro 2023 la KER-ekzamena Centro de UEA organizis du grandajn ekzamensesiojn, kun pluraj subsesioj. La unua ondo estis la retaj ekzamenoj en junio, kiam en tri sinsekvaj semajnoj laŭnivele (C1, B2 kaj B1) okazis ekzamenoj rete tra la tuta mondo. (Por C2-nivelo la reta sesio estis paralela kun la ĉeesta UK-sesio.) Kandi-

datoj/ekzamenitoj: 65 el 19 landoj; sukcesintoj: 58. La dua ekzamenperiodo estis dum la 108-a UK. Kandidatoj: 63; ekzamenitoj: 54; sukcesintoj: 46. La ekzameniĝintoj venis el 25 landoj. Sume en 2023 sukcesintoj estis 104 el 31 landoj (rezulto de la 13-jara agado estas: 2754 sukcesintoj el 82 landoj).

### Rilatoj kun la Akademio de Esperanto:

Laborgrupo de AdE daŭre kunlaboras kun UEA por la KER-ekzameno C2-nivela. Charters, Lo Jacomo kaj Wandel estas akademianoj, pro kio UEA konstante observas la ĉiutagan agadon de pluraj akademiaj sekcioj, interalie pri la litero ŭ (deklaro aprobita en aprilo), pri la ĝenerala vortaro (deka oficiala aldono al la Universala Vortaro, aprobita en septembro kaj preparo de la dekunua oficiala aldono). La sekcio Lingva Konsultejo detale pristudis kaj respondis plurajn aktualajn lingvajn demandojn. La Akademio kunsidis dum la 108-a UK kaj dum la VK. Ĝi organizis la trian Konferencon de la Akademio en decembro, aljuĝante la premion Laŭro de la Akademio, kiun sponsoras UEA, al Anna Löwenstein pro ŝia romano *La memoraĵoj de Julia Agripina.*

### Rilatoj kun ILEI:

Bute estas observanto de UEA ĉe ILEI, dum A. Mamduhi estas tiu de ILEI ĉe UEA. ILEI kunlaboris kun UEA en la subteno de afrika kartuna projekto. Dum la 108-a UK Marija Belošević gvidis la Tagon de Lernado, sub la temo "La mondo en mia klaso: pripensante pri enmigrintoj". Alessandra Madella kaj Luigia Oberrauch (sekciestrino de Italio) zorgis pri ILEI en la Movada Foiro, prezentis la Ligon kaj partoprenis en diskutoj de la Instrua Komisiono de UEA, disdonante malnovajn revuojn de ILEI. Partoprenis la kunkongreson de ILEI kaj TEJO ankaŭ Kadar, Bute kaj Lo Jacomo, krom la Ĝenerala Direktoro de UEA Martin Schäffer. "La 30 Oraj Horoj", projekto de ILEI kaj Itala Instituto de Esperanto (IIE), donis siajn unuajn rezultojn en instruado de Esperanto en itala klaso kaj ricevis premion de Erasmus+. Kadre de ĝi estis eldonita la libro de A. Madella *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*, ankaŭ en itala versio. Kun ILEI funkciis la projekto EToSo, jam menciita, por instruado de Esperanto al parolantoj de lingvoj, por kiuj malfacile organizeblas ĉeestaj kursoj: jam okazis kursoj en 9 naciaj lingvoj (la rusa, vjetnama, indonezia, araba, ĉina, svahila, persa, kurda kaj urdua) kaj en Esperanto por la niveloj A1, A2, B1, B2 kaj C1. En 2023 ricevis la diplomon de "Instruisto de la Jaro" la instruistino Liru Chen el Tajvano, kiu gvidas retkurson en la ĉina kaj adaptis la materialojn uzindajn aldone al bazaj tekstoj por rekta instruado, proponatajn de *Edukado.net*. La temo de la ILEI-kongreso estis "Instrui Esperanton en lernejoj", dum tiu de la ILEI-Simpozio estis "Instrui – ne nur Esperanton! – ekster lernejaj medioj". Kadre de la kongreso okazis trejnseminario pri Interkultura Kompetento por instruistoj, danke al subteno de Erasmus+ pere de IIE, organizita de Laura Brazzabeni kaj Radojica Petrović, kun daŭro de 4 tagoj kaj partopreno de preskaŭ 40 homoj el 23 landoj. Charters prelegis en la seminario kaj Arko estis ĉefpreleganto en la simpozio. Madella daŭre instruis Esperanton al la gestudentoj de la Esperanto-fako de la Zaozhuang-a Universitato kaj libervole al kelkaj gestudentoj de aliaj fakoj. La studentoj komencis korespondadon kun universitataj gestudentoj kaj aliaj junuloj en Italio, Japanio, Koreio kaj Rusio. En novembro Madella prezentis Esperantajn filmojn al 150 studentoj de la Fremdlingva fako kaj en decembro ŝi prezentis sian libron kadre de la celebradoj por la dekjariĝo de la Esperanto-Muzeo en Zaozhuang, kiujn sekvis Charters.

### Esploro kaj Dokumentado:

En 2023 la kernaj agadoj de la Centro por Esploro kaj Dokumentado pri la Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) prosperis danke al aktiva kaj engaĝita estraro kaj teamo de kunlaborantoj, esploristoj sur la kampoj de esperantologio, interlingvistiko kaj lingvopolitiko. La estraro konsistis el Fettes (direktoro), Guilherme Fians, M. Gazzola, Klaus Schubert kaj Tonkin. Renovigo de la konsilantaro efektiviĝis fine de la jaro; en majo elektiĝis dua asociita esploristo, D-rino Cecilia Gialdini, aldone al Xavier Alcalde. Sub redakta gvido de G. Fians, kun teknika subteno de Luis Obando, la dulingva CED-retejo *interlingvistiko.net* pliriĉiĝis kaj kompletiĝis. Tie nun troveblas la plenaj arkivoj de du CED-eldonaĵoj: *Informilo por Interlingvistoj* (IpI) kaj *Esperantologio/Esperanto Studies* (EES). Ambaŭ revuoj havas stabilan aperritmon kaj novan redakcion: IpI kun Başak Aray, Kimura Goro, J. A. Leoni, Bengt-Arne Wickström kaj J. Thomas kiel tradukanto por la anglalingva versio; kaj EES kun K. Schubert kaj Cristopher Gledhill. En grava paŝo Fians iniciatis kaj gvidis la aliĝon de EES al la internacia DOI-sistemo, reta indekso de akademiaj artikoloj. Same regule aperas la CED-revuo ***Language Problems and Language Planning*** (LPLP, ĉefredaktoro François Grin, vicredaktoro Gazzola). Ties interlingvistikan sekcion nun prizorgas grupo el la redakcia komitato de LPLP (Fettes, Fians, Sabine Fiedler, Kimura, Schubert). Okazis pluraj strategiaj diskutoj pri iniciatoj por levi la profilon kaj prestiĝon de LPLP kaj allogi pli da altkvalitaj artikoloj. Kadre de la 108-a UK okazis la **45-a Esperantologia Konferenco**, organizita kaj gvidita de X. Alcalde kunlabore kun Fettes. Dek esploristoj kontribuis en du trihoraj sesioj per prelegoj kaj du podiaj diskutoj pri universitata agado. La programo estis sekvebla ankaŭ rete. Tuj antaŭ la UK, en la samurba Universitato de Torino, okazis la 9-a Nitobe-Simpozio organizita de Gazzola. Fakuloj pri lingvopolitiko kaj rilataj kampoj kunvenis por du-
taga ekzamenado de la temo "75-a Datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj: kiu estas la stato de efektivigo de lingvaj rajtoj?". Interpretado funkciis inter la lingvoj Esperanto, angla kaj itala. Post sufiĉe aktiva jaro en 2022 la Programo por Interlingvistika Subteno aprobis unu subvencion en 2023, por la eldono de aŭdgvidilo en Esperanto por la Muzeo en Vieno. La tripersona juĝkomisiono por la subvencioj nun konsistas el Jacob Jespersen, Velimir Piskorec kaj Ida Stria.

### Biblioteko Hector Hodler kaj Arkivo de UEA:

Daŭris tre kontentige la katalogado de la Arkivo de UEA prepare al cifrecigo kaj disponigo al la publiko en la Aŭstria Nacia Biblioteko kaj Esperanto-Muzeo (ÖNB) en Vieno, post donackontrakto kun ÖNB en 2022. En majo 2023 estis efektivigita transdono de BHH (kiu troviĝis en Roterdamo dum multaj jaroj sen profesia konservado) al la Biblioteko Narodowa (Nacia Biblioteko de Pollando). Partoprenis solenan transdonan ceremonion en Varsovio Charters, Lo Jacomo, la Biblioteka Direktoro Tomaz Makowski kaj la Ministro pri Kulturo

kaj Nacia Heredaĵo Piotr Gliński, tiama Vicĉefministro de Pollando, kiu klarigis al la ĉeestanta publiko kaj en televida intervjuo la valoron de Esperanto kaj de la kolekto BHH por la pola nacio. En posta simpozio pri tiu temo organizita de P. Dubourg Glatigny, prezentiĝis la nova bibliotekisto specife dungita por prizorgo de la kolekto, la e-istino Gabriela Skonieczna.

**Aktivula trejnado:**
En 2023 oni okazigis la 100-an Seminarion por Aktivula Maturigo (AMO-seminarion), kiu okazis konvene en Hungario, la lando de la 1-a AMO-seminario (en marto 2014). Depost tiam ĝis la fino de 2023 okazis 107 AMO-seminarioj. Du el la seminarioj en 2023 okazis en novaj landoj por AMO: Ĉeĥio, kadre de la projekto VERDEN, kaj Latvio, kadre de BET. En 2023 okazis 12 AMO-seminarioj: 8 en Eŭropo, 1 en Ameriko (kadre de TAKE) kaj 2 en Afriko (Togolando kaj Burundo); 4 seminarioj estis virtualaj kaj 8 hibridaj. Temoj en 2023 gamis interalie tra internacia amikeco, fervoja ekologio, interkultura edukado (kunlabore kun ILEI kadre de ĝia kongreso), pioniraj virinoj (pere de la programo Erasmus+) kaj E-libroj en publikaj bibliotekoj. La komisiono de UEA pri AMO aktive helpis la realigojn. Jara resumo aperis en *Esperanto.*

## Administrado

**Centra Oficejo (CO):**
Dungitoj de UEA en 2023 estis Schäffer (Ĝenerala Direktoro), Ralph Schmeits (Administra kaj Financa Fako), Ionel Oneţ (Libroservo), Mallely Martinez (Sekretaria Fako) kaj Wunsch-Rolshoven (de junio 2023, Informado). Ĉar plej multaj el la dungokontraktoj estas por partatempa deĵorado, entute temis pri 3,03 ekvivalentoj de plentempaj salajratoj (EPS). La laboron krome subtenis (plene volontule aŭ kontraŭ modesta honorario): Rob Moerbeek (provlegado, Biblioteko), Pascal Zapelli (datumbazo, administra konsilado), Andrej Grigorjevskij (retejoj), Adjé Adjévi (revuoj, diversaj taskoj), L. Obando (voĉlegado, UEAviva, financoj, diversaj taskoj) kaj Miguel Bento (administra asistado). Dum la jaro daŭris la kunlaboro kun E@I rilate la Kongresan Fakon. Surbaze de la EPS UEA sukcesis akiri subvencion de EU kadre de la programo Erasmus+ por subteni la administradon kaj novajn iniciatojn.

**Komitato:**
Dum la 108-a UK okazis 2 hibridaj kunsidoj de la komitato, sabaton kaj vendredon. La komitatanoj, kiuj ne povis surloke ĉeesti, povis indiki anstataŭanton aŭ alternative partopreni rete. En Torino la Komitato elektis novan estraranon, Arko. Krome okazis, rete, eksterordinara kunsido por decidi pri la buĝeto 2024 (decembro 2023) kaj diskuti pri la 109-a UK.

**Estraro:**
La Estraro kun la Ĝenerala Direktoro kunsidis virtuale 22-foje dum la periodo, kutime ĉiun duan sabaton dum po 3-4 horoj por kunsido, el kiuj unufoje en Torino. Ne pasis tago sen retaj interŝanĝoj pri la diversaj aspektoj de la asocia laboro. Ĝenerale la estaranoj sukcesis disdividi la taskojn laŭ la deciditaj laborkampoj, tamen konsultante kaj tenante informitaj la kolegojn pri la evoluoj. Ili reciproke sin helpis pri difinitaj taskoj, aparte kiam premis profesiaj laborpostuloj. La pli longaj kunsidoj spegulis la pli intensan atenton, kiun bezonis la taskoj, kaj la kompleksajn faktorojn, kiujn ili devas konsideri, ekzemple pri la bezonataj ŝanĝoj en la CO, la Libroservo, la postuloj por nova administra programaro (AKSO, aparte raportita) kaj la specifaj bezonoj de la 1-a UK en Afriko. Dum 2023 aparte bonvenis la notindaj kontribuoj en specifaj laborkampoj de niaj pli novaj kolegoj, la antaŭe mankantaj estraraninoj Bute kaj Arko.

**Revuoj:**
*Esperanto,* inkluzive de la voĉlegitaj numeroj, aperis regule kaj akurate danke al diligenta laboro de la redaktoroj D. Ŝevĉenko kaj A. Striganova kaj la komisiito pri voĉlegado, Obando. Pere de li UEA ankaŭ subtenis voĉlegadon de *Monato* por Paul Peeraerts kaj Ligo Internacia de Blindaj E-istoj. De la revuo *Kontakto* aperis 6 numeroj (4-22/5+6/22,1-3/23). Ĝis julio 2023 redaktis Paweł Fischer-Kotowski. Poste redaktis Karina Oliveira. Ŝi sukcesis en malmulta tempo draste redukti la okazintan malfruon de la revuo.

**Financoj:**
2023 estis eksterordinare bona jaro. La Asocio sukcesis redukti kelkajn kostojn kaj samtempe akiri pli da rimedoj ol buĝetite. Pro tio la spezokonto ne nur estis denove ekvilibra, sed denove eblis krei rezervojn por “pluvaj tagoj”. Kontribuis tio, ke UEA unuafoje ricevis administran subvencion de EU por la programo Erasmus+. La subvencipeto de UEA estis farita laŭ kontrakto kun Kosmo Strategio. Sed same kiel en antaŭaj jaroj UEA spertis grandan donacemon. Krome, pro altiĝantaj rentoj UEA enspezis pli da mono danke al siaj investoj. Tio devos influi la enspezojn ankaŭ en la venontaj jaroj. Fine, ankaŭ pro kurzo-altiĝoj la Ĝenerala Kapitalo de UEA kreskis.

**Membraro:**
En 2023 UEA sukcesis havi ekzakte 4700 individuajn membrojn (IM), pli ol en 2022 (4552, +148). La IM venis el entute 130 landoj aŭ teritorioj: plej multe el Francio (401), Germanio (394), Brazilo (279), Usono (248) kaj Japanio (209). La tuta membraro de UEA (IM+AM) en 2023 estis 12829 personoj. La nombro da aligitaj membroj tamen reduktiĝis, kio estas punkto por konstanta atento, samkiel la nombro da membroj abonantoj, kio tamen estas normala tendenco de lastaj jaroj kaj la nuna epoko konsumi informojn elektronike, ne papere. UEA multe atentas pri la diverseco de sia membraro, kun aparta klopodo venigi pli da virinoj, pli da junuloj kaj garantii tutmondan reprezentecon. Aparte gravas la klopodoj pri junuloj, kio kreskigas la nombron da legantoj de *Kontakto* kaj subtenas la agadon de TEJO, kiu kunlabore kun UEA la duan fojon sinsekve superis pli ol 1000 membrojn (kiuj ankaŭ estas IM-oj de UEA).

**Konkludo:**
La misio de UEA, komuna misio de la e-istoj en la mondo, sendube estas giganta. La Asocio kaj la movado povas kaj daŭre bezonas antigi multon en la plej diversaj kampoj. Necesas konstante atenti pri la daŭripoveco de la Asocio kaj ĝia agado, inkluzive de la lokaj movadoj. Samtempe tamen necesas reliefigi, ke la farata laboro de la tutmonda E-komunumo estas ampleksega kaj nepre prifierinda. Tio eblas nur danke al la kunlaboro de granda reto da e-istoj en ĉiuj kontinentoj kaj el ĉiuj aĝoj. Al ĉiuj ili, al ĉiuj vi, la Estraro de UEA dankas, kun espero pri daŭrigo de tiu kunlaboro en 2024, fundamentita en la plej altaj valoroj por la Homaro: solidaro, konfido, paco – kaj dankosento.